

# UEN



—Kaj nun, kio okazos al ni!  
—Ne timu; ni tute ne nin okupas pri instruado.

NE ABONU ANKAŬ



**PAPITU'n**

Kataluna satira karikaturo gazeto.  
Aperas ĉiusemajne.



ABONO :

Hispanlando: jarkvarono. . . . . 2 Ptoj.

Fremdlando: > . . . . . 3 >

**PELAYO, 35 - BARCELONO**

**Neniu malbona esperantisto legas la**

**"FRANCA ESPERANTISTO,, 'n,**

KIUN ONI ABONAS EN

**46, BOULEVARD MAGENTA, PARIS**

**EN**

akceptas

**Poŝtmarkojn**

de ĉiu nacio por la pago de l'abono

# JEN

## La flugado de Sinjoro de Lajarte

Sinjoro Pujulà estas fumemulo. Oni nur povas distingi la pason de aŭtomobilo kaj lian pason pro laodoro: la nubego da fumo estas simila. Ĉiu scias, ke li pli preferas pipon ol cigaredon aŭ cigaron. Li manĝas kun pipo apud la telero; li promenadas kun pipo inter la lipoj, li skribas kun pipo ĉe la buŝo. Eniri en lian studoĉambron estas problemo ne solvebla per tiu, kiu ne kutimas fasi vizitojn en skafandro. Nur nun persono fumadas per simila fumigilo pli ol li: Sinjoro de Ménil.

La fumego, kiu eliras el iliaj pipoj estas tiel densa, ke unu fojon, ĝi preskaŭ okazigis al ili teruran malagrablaĵon. Tion rakontis al ni sinjoro de Lajarte. Fojon, sinjoro Pujulà vizitis sinjoron de Ménil ĉe lia hejmo en Parizo. Post salutoj kaj bondeziraĵoj, ne dezirante spili babiladon por ne ĝeni sinjoron de Lajarte, kiu, apude, raportis pri la dekmila aboninto al *Franca Esperantisto*, ili decidis ŝargi kaj bruligi siajn pipojn. Post dek minutoj, en la ĉambro estis kvazaŭ Londona nebulo. Unu ne vidis plu la aliajn. Kiam sinjoro de Lajarte skribadis *Esperantisto* n li ne plu vidadis *Franca*

n. Oni faris lumon. Oni daŭris fumante.....! Jen unu japana statueto falas el sia breto. Sinjoro de Lajarte subite eltirita el sia laboro per la azia bruoj, ektimas pri tertremo. Li kuradas, saltadas, faladas tra seĝoj, super tabloj, ĉirkaŭ fortepiano al la fenestro. Li rigardas tra la vitroj kaj ekjetas krimon!

— *Mon Diŭ, mon Diŭ!*

Sinjoro de Lajarte, kiu naskiĝis en Agen aŭ apud Agen, en la teruro, ekkriis per kora natura lingvo, kaj per ĝi klarigis al la amikoj —tra la malklareco de la ĉambro— ke Parizo estas tre sub la domo; unuvorte, ke la domo flugas, ke la domo aerostatiĝis pro la fumado. Li intencis malfermi la fenestron por sin ĵeti tra la spaco. Sinjoro de Ménil haltigis lin tre trankvile:

— Ne malfermu! La fumo forirus, kaj la subirado estus tro rapida!— Kaj li daŭris fumante.

La domo flugis, flugadis. La vento forblovadis ĝin. Oni ne plu vidas la teron. La pipoj estingiĝis. Oni trarigardis landkartojn, spackartojn; oni observadis kompasojn.....

—Kien ni estas pelitaj— demandis sinjoro Pujulà?

—Al Skotlando—respondis sinjoro de Lajarte, skuante termometron.

— Bone; ni trinkos viskion.



### LA ENVIULOJ


—Se aŭstataŭ ludi la komediaĉojn de Kolowrat, Gual, Pujulà... mi dancus la boleron, nun mi jam havus la famon kaj la brilantojn de la Bela Otero.





—Via amatino, amiko, iradas tre malriĉe vestita. Ĉu vi ne donas al ŝi monon.

—Ne necese; mi promesis al ŝi edziĝon.



—Kiom da gumo por la kraĵono!

—Efektive; Skotlando estas lando de viskio.

—Viskio Buchanan kaj tiel plu.

—Kaj ni vidos sinjoron Warden.

—Ankaŭ sinjoron Page.

—Kaj ni trinkos viskion.

—Jes, ni jam diris.

Post unu horo, ili falis en Skotlandon. Ili vidis sinjorojn Warden, Page, Buchanan, kaj ĉiun simpatian skoton. Sed malŝerpe, ili falis apud sobremman restoracion, kaj anstataŭ trinki viskion, ili lesivis la intestojn per plej diverskoloraj akvaĵoj.

Kiam sinjoro de Lajarte rakontis tion al amiko nia, oni rimarkigis al li, ke la okazintaĵo estas tre stranga kaj nekredebla, tial ke la domo de de Ménil kuŝas ankoraŭ en Parizo.

Li respondis simple:

—Jes; ili refumadis, kaj la domo resuprenflugis. De Skotlando ni ree flugveturis al Parizo.

—Sed diru—oni ankoraŭ demandis sinjoron de Lajarte—ĉu sinjoroj Pujolà kaj de Ménil jam ne plu fumadas? Ĉar iliaj domoj ne plu suprenflugas kaj ili kuŝas fortike en Parizo kaj Barcelono.....

—Ne, ili ĉiam fumas kaj fumadas—respondis sinjoro de Lajarte—sed iliaj domoj nun estas ankrumitaj.

Ni ne devas forgesi, ke sinjoro de Lajarte nia kara amiko de Lajarte estas gaskono, el sama lando kiel glora Cyrano de Bergerac, kiu ankaŭ vojaĝis al la Luno.



## PAPERAJOJ

(JEN raportos tre serioze —laŭ ĝia kutimo— pri ĉiu presaĵo komunikita al ĝi).

GULLIVER EN LILIPUTLANDO. — La firmo W. Speaight & Sons, Petter Lane, E. C. Londono, eldonis en Esperanto tiun faman verkon de Swift, kun ilustraĵoj de J. R. Monsell. Fraŭlino M. Inman, la tradukantino, havis bonan ideon traduki tiun aventuran romanon, kiu revivigas niajn infanajn jarojn. Kiu ne konatiĝis kun Gulliver tra pli-malpli bonaj tradukaĵoj? Li estas, por la infanoj, heroo, kiel Philleas Fog, la persono elpensita de Jules Verne, kiu rondiris la mondon en 80 tagoj! Kun kia naiveco, la aŭtoroj kaj la legantoj, ili preterpasas kun la herooj ĉiujn malhelpaĵojn..... escepte la diversecon de lingvoj, pri kiu eĉ oni ne parolas..... Ni eraras; Gulliver lernis baldaŭ la lingvon de la nanuloj ĉar li havis bonegan memorecon; per tio li estis supera al ni, nunaj homaranoj, kiuj ofte eĉ ne memoras la vortojn kaj sintakson de niaj propraj naturaj lingvoj. Aliflanke, nun la problemo estas facile solvebla por la nunaj verkistoj pri vojaĝoj kaj aventuroj. Sufiĉas, ke ili klarigu ke la herooj kunportas en siaj poŝoj la

VORTARON ESPERANTO-KAJ ESPERANTO-FRANCAN, de Emile Boirac, presitan ĉe Darantiere, 65, str. Chabot-Charny - Dijon. Kompreneble, por uzi ĝin estas necese koni la lingvon Esperanton... Sed, kiu instruita homo ne konas jam ĝin? Cetere, tiu vortaro kuntenas ankaŭ francan vortaron. Ĝi povus do utili eĉ al sinjoro Remy de Gourmont, kiu ankoraŭ ne konas nian lingvon.



—Konsoliĝu, mia kara; same okazis al patrino Evo, kaj Adamo ne estis tiel beltalia kiel mi!



La malriĉa amiko: — Jes; se oni ne donas al ni liberecon, ni devas ĝin postuli per la forto, la bruligo, la revolucio.

La riĉa amiko: — Kiel strange, karulo, ke en via aĝo, vi ankoraŭ havas similajn ideojn!





DON KIĤOTO KAJ DON BLERIOTO

—Mi ankaŭ trairis la Manĉon, kaj la gazetoj ne tiel multe raportis pri mi!



— Kion novan el Parizo ?  
— Mi vidis Fallières.  
— Kaj, kion li rakontis al vi ?



—Ĉu vi ne respondis al la bleko de «L'Immonde Esperantiste».  
—Ne; la oficisto de la Poŝtoficejo diris al mi, ke oni ne povas sendi rekomenditan vangofrapon.





Saba



ANKAŬ ESTONTISTOJ

- Kion vi opinias pri la *Futurismo* de Marinetti, tiu nova itala filozofia teorio ?  
— Ne interesas min. Ĝi ne estas nova. Oni parolis al mi pri ĝi antaŭ kelkaj horoj.



### LA REDAKTORO DE «L'IMMONDE ESPERANTISTE»

—Estas koleriga! La esperantistoj estas avaruloj el la plej terura speco. Vi povas ataki kaj insulti ilin de ĉiu flanko, tamen ili ne donos al vi eĉ unu spesdekon.

**M**

IA filo, mia estimata filo lernu multajn lingvojn!

Kaj la estimata filo lernis, kion lia patrino konsilis: multajn lingvojn.

Filidoro estis tre inteligenta. Kiam li nur havis tri jarojn, li ne boradis sian nazon per la fingroj, nek malpurigadis siajn vestojn dum la manĝo, nek desegnadis kokojn kaj domojn sur la kontolibroj de sia patro. Lia patrino komprenis, ke li estas difinita por okupi en la socio superan lokon. Kaj de lia plej juna aĝo, ŝi klinis lin al la lernado de lingvoj. Homama deziro! Ŝi deziris, ke neniu popolo restu nekompreninte la ideojn, kiuj naskiĝos en la inteligenta spirito de Filidoro.

Kiam Filidoro, estis dekjara, li sciis diri tute flue: *bonjour, good morning, buenos días, gütten tag kaj buon giorno*. Kiam li havis dek du jarojn, li povis deziri bonan vesperon, en araba, ĥina, hinda, hebrea kaj malgaĉa lingvoj kaj en dialekto de Montpellier. Jam matura,

li povis paroli okdek ok lingvojn, tridek tri dialektojn kaj dekduon da slangoj al diversaj gentoj.

Kiam li estis posedanta tiun riĉan ilaron por komunikiĝi kun la aliaj; kiam li opinis finita sian ellernadon pri lingvoj, li serĉis okupon.

Mi ankaŭ serĉis lin, kaj mi lin renkontis en hotelo, kie li plenumadis la gravan rolon de interpretisto helpanta la riĉajn kaj saĝajn vojaĝantojn, kiuj akiras per kelkaj moneroj tion, kio de li postulis lian tutan vivon.

Filidoro premis mian manon, kaj pripensinte ke li vivadis okupata nur en la lernado de lingvoj kaj ne havante tempon por lerni ion alian, li diris al mi kun ĉagrena mieno:

—Mia kara, mi scias diri per pli ol cent malsamaj lingvoj, ke mi havas nenion por diri.





—Oni plendas, ke ĉie nur kuŝas preĝejoj kaj monaĥejoj kaj jen, kiom da tero, kiu eĉ ne estas plugita!

## NE ABONU LA GAZETON

Unu jaro . . . . 3 Fr. (1,200 sm.)  
 Jarduono . . . . 2 „ (0,800 sm.)

# JEN

Eldonisto: RAMON FARRÉ. str. Portaferrissa, 17, BARCELONO. (Li petas, oni faru la pagon per la ĈEKBANKO  
 ESPERANTISTA Merton Abbey. LONDON SW.)


### REPREZENTANTOJ.

- G. Warnier, «Librairie de l'Esperanto» 15, rue Montmartre, Parizo.
- Möller & Borel, «Esperanto Verlag» 18/19, Lindenstr. BERLINO SW.
- Andr. Fred. Host & Son, Kg. L. Hofboghandel. Bredgade, 35, KJOBENHAVN.
- «The British Esperanto Association» Museum Station Buildings, 133-6, High Holborn, LONDON. WC.
- Libroeldonejo «Esperanto» — Valovaia, kv. 5.—MOSKVA.
- Kiosko 77<sup>a</sup>, 10. Boulevard Capucines. PARIS

# HUMORO DE L'AVOJ

BRITUJO

RICHARD DOYLE



Britaj moroj de la jaro 1849<sup>a</sup>

# FREMDA HUMORO

FRANCUJO

PAUL IRIBE



Karikaturo de P. Iribe laŭ Gris

Paul Iribe realigis unu el la plej malfacilaj aferoj por karikaturisto: li kunigis la ridindecon kaj la elegantecon. Per linio delikata, saĝa kaj konciza, kvazaŭ de japana brodistino; per delikata koloro, kvazaŭ de Saksa porcelano, kaj per kunmeta arto, kiu staras inter Toulouse-Lautrec kaj Aubrey-Beardsley, Iribe paroligis sur la papero sian animon de defalanta aristokrato. La diplomataro kaj la mondumuloj disjetis tra la tuta mondo liajn homerajn malspritaĵojn.

La diplomatoj, generaloj, politikistoj, riĉuloj, blusanguloj, kaj precipe la principetoj kaj markizinetoj kaj ĉiuj akolitaj kaj parazitaj de tiu privilegia gento, en ilia luksa kaj komforta ambio, en tiuj internaĵoj tiel delikate virinecigitaj de la volo de tiu artisto, li jetis la plej strangajn malspritaĵojn por la plezuro kaj

distro de la bonaj burĝoj, kaj venĝo de la makleristoj.

Li ne estas kruela nek moralisto kiel Forain; li pli estas *jemenfichiste* sen transcendeco; liaj seriozaj ministroj kaj *aristos* diras la sensecaĵojn kun la plej groteskaj mienoj; kaj liaj knabinoj de la *faubourg St. Germain* elparolas la plej krutajn teruraĵojn kun tia rozkolora honesta vizaĝo, ke ni faldiĝas pro rido.

Ni povas rekomendi al tiuj, kiuj interesiĝas pri la verko de tiu delikatulo — ĉi tie ni ja povas paroli pri delikateco ne timante trograndigi — ni povas rekomendi, kiel sintezon de li, numeron de la *Assiette au Beurre* dediĉitan al la edziniĝontaj fraŭlinoj, katalogon, kiun li desegnis por modistino el Parizo, kaj lian konstantan kunlaboraĵojn ĉe la *Temoin*.

JOAN SACS.



LA FIRMO

HACHETTE KAJ K<sup>IO</sup>

79, Boulevard Saint - Germain

Paris

APERIGOS BALDAŬ

VORTARON

Esperanto Esperantan

DE KABE

NE AĈETU ĜIN ANTAŬ OL ĜI ESTOS APERINTA

ĈIUJ ESPERANTISTAJ GEJUNULOJ  
ĈIUJ ESPERANTISTOJ DEZIRANTAJ CERTIGI LA ESTONTON DE ESPERANTO

DEVAS LEGI, ABONI, KONIGI LA GAZETON

JUNECO

Oficiale elektitan, ĉe la Barcelona Kongreso, kiel organon por la ĉiulandaj Esperantistaj gejunuloj

JUNECO publikigas propagandajn artikolojn, Kurson de Esperanto, literaturajojn plej bone redaktitajn Ĝi estas malfermita al la konkursojn.

KUNLABORADO DE ĈIUJ SIAJ ABONANTOJ

JUNECO estas la Sola Esperantista gazeto, kiu publikigas plenan Kronikon pri la tutmonda Esperanta movado ĉe la gejunuloj.

Specimeno senpage ricevebla

Jara Abono. . . . . 4 Fr.      Franclando. . . . . 5 Fr

Kune Kun Franca Esperantisto. . . . . 6 Fr.

Administrejo: 152 B<sup>o</sup>-Raspail. — PARIS



— Estas bedaŭrinde, ke la aŭtoro de tiu bela drampoemo vivadas sufokite en la manoj de pocentegistoj.  
— Oni ne povas nei, ke li estas *poemulo*.